

X 8-a MARKOLA KONGRESO

X FOLKESTONE

X 1-3 Majo 1970.

St. Andrews Guesthouse

East Cliff Gardens

-----  
2-a INFORMILO

ĜIROKONTO Pagojn per internacia ĝiro oni sendu al Brita Poŝtoĝiro 32:651:4007, en la nomo de '8-a Markola Kongreso', 1 Brambley Crescent, Folkestone, Kent.

LOKA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto: Gordon Hawker  
Sekretario: Joyce Hawker  
66 Blackbull Road, Folkestone, Kent.  
Kasisto: John Rapley  
1 Brambley Crescent, Folkestone, Kent.  
Membroj: Helga Rapley  
Norah Razzell  
PERANTO: Jacques Doyelle  
9 Rue de Dunkerque, 59 Bourbourg,  
Francujo.

SUKCESO! Ek de la unua dissendo de nia varbilo la aliĝoj super-  
zumis kiel jeto, kaj ĝis hodiaŭ ni jam havas 57 enskribojn. Ĉar la  
gastodomo entenos maksimume 109 personojn, tiuj kiuj intencas parto-  
preni kaj ankoraŭ ne enskribiĝis, devas rapide rezervi siajn lokojn!

Ni jam antaŭĝojas pri la kuniĝo de tiom da Markolanoj novaj kaj  
malnovaj, kaj precipe esperas ke niaj belgaj kaj francaj amikoj  
tuj sin anoncos, eĉ se ili ne povas nun sendi al ni antaŭpagon.

TAKSIO! Ni aranĝos ke unu el niaj aŭtoj renkontu vagonarojn kiuj  
alvenas el la Londona direkto ĉe stacio Folkestone Central je  
vendredo inter la horoj de 15.15 kaj 18.20. Ni bonvenigus helpon  
kun la ŝoforado fare de kongresanoj kiuj povas alveni frue dum  
vendredo. Troviĝas ankaŭ publikaj taksioj ĉe la centra stacio,  
kosto proksimume 4 ŝilingojn.

AŬTOBUSOJ Se vi alvenos per longdistanca aŭtobuso, ĝi haltos en  
Bouverie Square. De tie iru antaŭen trans la strato al haltejo de  
loka buso 107 kiu veturas rekte al St. Andrews. Ankaŭ en Bouverie  
Square troviĝas publikaj taksioj kiuj portos vin al St. Andrews je  
kosto de proksimume 4 ŝilingoj.

HAVENO Taŭga boato foriros de Kalezo je tagmezo kaj atingos  
Folkestone je la 13-a 25. Tie oni renkontos la eksterlandanojn kaj  
kondukos ilin rekte al la gastodomo.

Bonvolu averti nin se vi alvenos je alia horo, alia haveno (Dovro)  
aŭ per aviadilo Lydd/Ashford flughavenoj, kaj se vi bezonos helpon.

VESPERMANĜO Je vendredo okazos je 18.30. Se vi alvenos post la  
19-a horo, bonvolu sciigi nin. Certe ni povos ion aranĝi por ke  
vi ne malsatu!

KOMFORTOJ KAJ UTILECOJ La gastodomo disponigas al ni aŭtoparkon  
sufiĉe grandan kiu estas eĉ ŝlosebla. Se la vetero ne nin favoros,  
vi tamen restos komfortaj: la konstruaĵo estas ekipita per centra  
hejtado kaj fluanta varma kaj malvarma akvo en ĉiuj litĉambroj.

Se vi havas malfacilaĵojn je alveno vendredon telefonu al ni ĉe  
la gastodomo Folkestone 51081.

EKSKURSO Ni mendis aŭtobuson por la ekskurso al Canterbury, sed depende de la lastmomentaj aliĝoj, ni eble bezonos pluan. Por helpi nin en nia dilemo, se vi intencas partopreni, bonvolu indiki tion ĝis la 20-a de Aprilo.

KONTOJ Eble vi ricevos kun tiu-ĉi informilo kalkulon de la saldo de via konto en niaj libroj. Ni petas, ke vi ĝin kontrolu kaj kunportu al Folkestone (aŭ sendu kun via paĝo se vi decidus pli frue ĝin kvitigi).

Laste ni devas pardonpeti al S-ro Doyelle kaj al francaj Markolanoj, ĉar li, nia kara peranto, pro teknika eraro de la LKK, lasta el ĉiuj ricevis nian unuan informilon!

PLANO DE FOLKESTONE estas ĉi-sendata. Troviĝas sur la plano la jenaj gravaj lokoj:

Fervojo Stacidomo kaj Aŭtobus-haltejo - Ruĝe markitaj  
St. Andrews Gastodomo - Verde markita

### ĜIS LA REVIDO JE LA MAJOTAGO!

LISTO DE KONGRESANOJ ĜIS 15-a de Marto 1970:-

- |                                 |   |
|---------------------------------|---|
| 1. S-ino M. Bennett, Chorley    | 29. F-ino A. George, Peacehaven         |
| 2. F-ino K. Clamp, Londono      | 30. F-ino M. George, Peacehaven*        |
| 3. S-ro N. Rytjkov, Londono     | 31. S-ro R. Markarian, Shenfield        |
| 4. S-ino N. Razzell, Brighton   | 32. F-ino J. Markarian, Shenfield       |
| 5. S-ro L. Razzell, Brighton    | 33. S-ino T. Markarian, Shenfield       |
| 6. S-ro P. Wallis, Maldon       | 34. S-ino J. Slaughter, Brighton        |
| 7. S-ro G. Hawker, Folkestone   | 35. S-ro F. Ditacroute, Calais          |
| 8. S-ino J. Hawker "            | 36. S-ino A. Ditacroute, Calais         |
| 9. S-ro J. Rapley "             | 37. S-ro J. Doyelle, Bourbourg          |
| 10. S-ino H. Rapley "           | 38. S-ino M. Doyelle, Bourbourg         |
| 11. S-ro A. Hughes, Ashford     | 39. S-ro L. Bourgeois, Noyelles-Godault |
| 12. S-ino E. Hughes, Ashford    | 40. S-ro G. Bennett, Hove               |
| 13. S-ro G. Atkinson, London    | 41. S-ino L. Bennett, Hove              |
| 14. S-ino G. Atkinson, London   | 42. F-ino M. Bennett, Hove              |
| 15. S-ro B. Barker, Maldon      | 43. F-ino E. Mallett, Londono           |
| 16. S-ro J. Farmer, Ryde        | 44. S-ino M. Tregunno, Brighton         |
| 17. S-ino K. Farmer, Ryde       | 45. S-ino R. May, Brighton              |
| 18. S-ino M. Smith, Dover       | 46. S-ro H. Holmes, Londono             |
| 19. F-ino H. Nixon, Leeds       | 47. S-ino N. Holmes, Londono            |
| 20. S-ro A. Marmenout, Belgujo  | 48. S-ro J. Wilfrid, Londono            |
| 21. S-ino D. Marmenout "        | 49. S-ro R. Ward, Bexleyheath           |
| 22. S-ro A. Venture, Carshalton | 50. S-ro G. Wood, Bexleyheath           |
| 23. S-ino E. Venture "          | 51. S-ino A. Barnes, Upminster          |
| 24. S-ro R. Dimond, Beckenham   | 52. S-ro D. Bills, Dartford             |
| 25. S-ro W. Goodes Hornchurch   | 53. S-ro R. Ekberg, Londono             |
| 26. S-ro R. Lusson, Epsom       | 54. S-ro E. Ockey, Banstead             |
| 27. S-ro J. Brownlee, Upminster | 55. S-ino E. Ockey, Banstead            |
| 28. S-ino F. Brownlee "         | 56. S-ino D. Worcester, Londono         |
|                                 | 57. S-ino C. Major, Londono             |

\* Nur unu semajnon post sia aliĝo, mortis F-ino May George, kiu estis multjara membro de Sudorienta Federacio. Al ŝia fratino ni esprimas koran kondolencon.